

Hieronimo: Vivo de Malho

– Hieronymus: Vita Malchi –

verkita en Betleĥemo en 391

el la latina¹ tradukita de Gerrit Berveling en 2013

Plano por verki Eklezian Historion

1. Kiu intencas fari mar-batalon, tiuj preparas sin en havenoj kaj sur kvieta maro, manipulante stirilon kaj remilojn, pretigante hokojn kaj tenilojn. Ili dismetas siajn soldatojn sur la ferdeko, kaj kutimigas ilin stari ekvilibre kun piedoj deklivaj kaj sur joriga grundo; tiel ili ne ektimas en realeco, je kio en simulita batalo ili jam al kutimiĝis. Tiel same pri mi, kiu longtempe silentis (ja igis min silenti iu, por kiu estas dolorige se mi parolas), sed nun, kiam mi planas verki pli vastan historion, unue mi deziras ekzerci min en verko malgranda, kvazaŭ dezirante forigi la ruston de mia lango.

Ĉar mi decidiĝis (se la Sinjoro bonvolas doni al mi la vivon; kaj se miaj kritikantoj fine ĉesos persekuti min, ĉar mi nun estas rifuĝinto, kiu sin enŝlosis en monaĥejon) verki Eklezian Historion de post la veno de la

¹ cap. 1: PL XXIII, col. 55 - 62, ed. J. P. Migne, Paris 1883; cap. 2 - 10: Christliches Leben im spätrömischen Reich, ed. M. Fuhrmann, Münster 1980
http://www.hs-augsburg.de/~harsch/Chronologia/Lspost04/Hieronymus/hie_malc.html
(2013-09-14)

Savanto ĝis nia propra epoko, t. e. de post la apostoloj ĝis la fekaĵo dum kiu nuntempe ni vivas, kaj montri kiel kaj per kiuj naskiĝis la eklezio de Kristo, kiel ĝi adoltiĝis, kiel ĝi kreskis per la persekutoj kaj estis kronita de martirecoj; kaj kiel post kiam ĝi venis al kristanaj imperiestroj, ĝi ja kreskis en potenco kaj riĉeco, sed malkreskis en virtoj. Sed pri tio aliloke.¹ Nun unue la entreprenita afero.

Kiel junulo Hieronimo loĝis en Sirio

2. Maronio estas eta vilaĝo, ĉirkaŭ tridek mejlojn² oriente de Antioĥio en Sirio. Post multaj mastroj aŭ administrantoj, en la tempo kiam kiel junulo mi estis en Sirio, <tiu ĉi vilaĝo> fariĝis posedaĵo de papo³ Evagrio, mia persona amiko. Mi mencias lian nomon por montri, de kie mi ekhavis la informojn, surbaze de kiuj mi skribos.

Estis tie certa oldulo, Malĥo laŭnome – latine ni povas traduki tion kiel «Rex»⁴ – Siriano laŭ nacieco kaj laŭ lingvo, vere iu lokulo. Lia kompanino estis maljunulino, kiu aspektis ege kaduka kaj proksima al la morto, ambaŭ estis tiel ĵaluze piaj kaj tiel insiste vizitadis la preĝejon, ke oni povus preni ilin por Zahario kaj Elisabeta en la evangelio, krom ke tie mankis Johano.⁵ Kiam ĉe najbaroj mi scivole informiĝis, kio estas la ligo inter ili, ĉu estas geedzeco aŭ parenceco aŭ spirita ligiteco, ili ĉiuj unusone respondis, ke ili estas sanktuloj, plaĉaj al Dio, kaj respondis plej mirigajn aferojn. Dezirante ekscii pli, mi aliris al la viro mem, pridemandis lin detale kaj ricevis la sekvajn informojn.

¹ Efektiviĝis tiu ĉi plano iom malsame: la verko nun estas konata kiel *De Viris Illustribus* aŭ *De Scriptoribus Ecclesiasticis* laŭ enkondukaj vortoj de Hieronimo mem: *Pri Famuloj* aŭ *Pri Ekleziaj Aŭtoroj*. Efektive ĝi estas nia unua *Patrologio*.

² Roma mejlo estis 1478 m.

³ = episkopo.

⁴ = reĝo.

⁵ Laŭ Luko 1:5-80

La historio de Malĥo

3. Mi, li diris, mia filo, mi laboris sur peceto da grundo en Nisibeno, sola infano de la gepatroj. Ĉar ili konsideris min heredanto kaj sola postvivanto de ilia gento, ili instigis min al geedziĝo, sed mi respondis, ke prefere mi fariĝos monaĥo. Kiom minacis min la patro, kiom flatis min la patrino por delasi la ĉastecon, pruvas la nura fakto, ke mi fuĝis el la hejmo kaj de la gepatroj. Kaj ĉar orienten iri mi ne povis pro la apudeco de l' persa regno kaj la limgardado de la romiaj soldatoj, mi turnis miajn paŝojn okcidenten, kunprenante nur malmulte da provianto por ŝirmi min iomete kontraŭ la mizero. Por diri mallonge: fine mi atingis la dezerton de Ĥalkido¹, kiu situas pli malpli inter Imo kaj Beroo, sed pli sude. Tie mi trovis kelkajn monaĥojn, sub kies gvidadon mi min metis, vivtenante min per manlaborado kaj venkante la volupton de la karno per fastado.

Post multaj jaroj min kaptis la deziro reiri al la patrujo, kaj, dum ankoraŭ vivis la patrino (ĉar mi aŭdis, ke la patro jam mortis), subteni ŝin en ŝia vidvineco, kaj poste vendi la malmultan heredaĵon kaj parte donaci ĝin al malriĉuloj, parte konfidi al monaĥejo kaj (kial mi hontu konfesi mian mankon de fido?) parte rezervi ĝin por elspezi por propra komforto.

Tiam mia abato komencis kribi, ke tio estas tento de la diablo, kaj ke sub vualo de honesta afero kaŝas sin la ruzo de la praa malamiko. Estis ekzemplo – liadire – de hundo kiu reiras al sia vomitaĵo;² sammaniere jam multaj monaĥoj estas trompitaj; la diablo neniam agas malferme. Li prezentis al mi plurajn ekzemplojn el la Biblio, i. a. ke en la komenco eĉ Adam kaj Eva estis superruzitaj de li per la espero fariĝi Dioj.³ Kiam li ne sukcesis persvadi min, li falis antaŭ mi sur la genuojn, kaj petegis, ke mi ne forlasu lin, ke mi ne pereigu min mem, ke mi ne, tenante la plugilon,

¹ Dezerto en la limregiono inter Turkujo kaj Sirio. Ne konfuzu kun Ĥalkido en Greklando, sur Eŭbojo.

² 2 Pet 2:10b-22

³ Gen 3:1-21

retrorigardu.¹ Ve mi malfeliĉa! Per fia venko mi venkis mian konsilinton; mi pensis, ke ne mian saviĝon li serĉas, sed sian komforton.

Li akompanis min el la monaĥejo, kvazaŭ por funebra procesio, kaj fine adiaŭante «Mi vidas», li diris, «ke vi, mia filo, portas la brulstampon de Satano. Mi ne serĉas la kialon, nek akceptas pardonpeton. Ŝafo, kiu forkuras el la ŝafejo, estas tuj elmetita al la faŭko de l' lupoj.»

Forkondukita kiel kaptito

4. Se oni iras de Beroo al Odeso, apude al la ĉefvojo estas dezertaĵo, tra kiu vagadas la Saracenoj kiuj ne havas fiksitan loĝlokon. Pro timo tiuflanka la vojaĝantoj en tiuj regionoj ofte amasiĝas por per reciproka helpo eskapi minacantan danĝeron. En mia grupo estis viroj, virinoj, maljunuloj, junuloj, etuloj, ĉirkaŭ sepdek personoj kune. Subite jen sur dorsoj de ĉevaloj kaj kameloj atakis nin Iŝmaelidoj², la flirtantan hararon ligita per rubandoj, la korpojn duonnudaj, kun grandaj soldato-botoj kaj manteloj; la saguoj pendis ŝultre, la pafarkoj ne estis streĉitaj, dum la lancojn ili vibrigis. Ili ja ne venis por batali, sed por disrabi. Oni nin kaptis, dispelis kaj kuntrenis ĉiudirekten. Intertempe tro malfrue pentante, kaj tute ne plu kapabla ekposedpreni mian heredaĵon, kune kun alia kompatinda persono, iu virino, mi estis asignita kiel sklavo al unu sama mastro. Oni nin irigis aŭ pli ĝuste portis nin supre sur kamelodorso tra vasta dezertaĵo, dum ĉiumomente ni timis falegi, kunligite pli ol sidante. Nia nutraĵo estis duonkruda viando, nia trinkaĵo kamelolakto.

¹ Luk 9:62

² Devas esti dezertaj nomadoj.

Li devas paŝti ŝafojn

5. Fine, pasinte grandan riveron, ni atingis la internon de l' dezerto, kie, laŭ la kutimo de tiu popolo, ni devis montri respekton al la mastrino kaj ties infanoj; ni klinis la kapojn. Kvazaŭ estante kaptito, mi devis ŝanĝi la vestojn, t. e. mi devis lerni iri nuda, ĉar la varmeco estis tiel forta, ke mi ne povis porti ion krom por kovri la seksorganojn. Oni donis al mi kelkajn ŝafojn por paŝti, kaj pripensante mian mizeron, mi en tio trovis konsolon, ke la mastron kaj la kunsklavojn apenaŭ mi vidis. Mi pensis, ke mia sorto similas al tiu de Jakobo en la Biblio, kaj ankaŭ memoris pri Moseo; ĉar ambaŭ foje estis paŝtistoj en dezertaĵo. Mi nutris min per freŝa fromaĝo kaj lakto, daŭre preĝadis kaj kantis la psalmojn, kiujn mi lernis en la monaĥejo. Mi ĝojis pri mia kaptiteco, kaj dankis al Dio, ĉar en la dezerto mi retrovis la monaĥon, kiun en la patrujo mi estis perdonta.

Devigite li akceptas kunsklavinton kiel edzinon. Virto de la kaptita virino.

6. Ho, nenio iam ajn estas sekura kontraŭ la diablo! Ho, kiom buntaj kaj nekapteblaj estas liaj kaptiloj! Eĉ en mia kaŝejo trovis min lia fienco. Kiam la mastro rimarkis, ke lia gregoj kreskas, kaj kiam li neniel trafis min ĉe trompaĵo (mi ja sciis, ke la apostolo¹ ordonis ke oni obeu la mastrojn kvazaŭ obeante al Dio mem), kaj kiam li intencis kompensi min por des pli sekurigi mian fidelon al li, li donacis al mi la kunsklavinton, kiun oni kaptis samtempe kiel min. Kiam mi rifuzis, dirante ke mi estas kristano, kaj ke mi ne povas akcepti iun kiel edzinon dum ŝia edzo ankoraŭ vivas (samtempe kun ni estis kaptita ankaŭ ŝia edzo, sed alia mastro forkondukis lin), la mastro senindulge ekkoleris, tiris sian glavon kaj atakis min. Se mi ne tuj elstreĉus la brakon por posedpreni la virinon, li tuj surloke estus murdinta min.

¹ = Paŭlo.

Nokto pli malluma ol kutime ekvenis, kaj por mi tro rapide. En groton duonruinigitan mi kunportas la novan edzinon; tristo estis nia honora fraŭlino; ambaŭ ni malemis al la alia, sed ni ne konfesis tion. Nur tiam mi vere eksentis mian sklavecon, kaj ĵetinte min planken mi priploris la monaĥon, kiun mi perdis, dirante: «Ho kompatinda mi! Ĉu por tio mi estis indulgita? Ĉu miaj pekoj kondukis min ĉi tien, ke jam griziĝante mi – virga – fariĝu edzo? Kiom helpis al mi, ke la gepatrojn, la patrujon, la patran heredaĵon mi malestimis pro la Sinjoro, se nun mi devas fari, kion mi deziris eviti malestimante ilin? – krom eble ke tion ĉi mi devas nun elteni, ĉar mi resopiris al la patrujo.

Kion ni faru, ho mia animo? Ĉu ni pereos aŭ venkos? Ĉu atendi la manon de la Sinjoro aŭ morti per propra armilo? Turnu la glavon al vi mem! Via morto, ho animo, estas pli timinda ol tiu de la korpo! Ankaŭ la savita ĉasteco havas sian martirecon. La atestanto pri Kristo kuŝu sentombe en la dezerto. Mem mi estos por mi mem persekutanto kaj martiro!»

Tion dirante mi tiris la glavon kiu brilis en la mallumo, direktis ĝian pinton al mi mem kaj diris: «Saluton, malfeliĉa virino; havu min prefere kiel martiron ol kiel edzon.»

Tiam ŝi sin ĵetis al mi antaŭ la piedojn kaj diris: «Mi priĵuras vin je Jesuo, mi petas vin je l' neceso de ĉi momento: ne verŝu vian sangon, ne ĵetu ties kulpon sur min. Se la morton vi preferas, unue turnu la glavon al mi. Prefere tiel ni unuiĝu! Se mia edzo eĉ revenos al mi, mian ĉaston mi estus savinta, kiun mi lernis en kaptiteco; prefere mi mortus, antaŭ ol perdi ĝin. Kial vi mortu por ne unuiĝi al mi? Mi mortus, se vi dezirus tion. Havu min do kiel edzinon de ĉasteco kaj amu min pli en ligiteco anima ol vi povus korpe. La mastroj kredu, ke vi estas mia edzo; Kristo scias, ke vi estas mia frato. Facile ni konvinkos, ke ni estas geedzoj, kiam ili vidos kiom ni amas nin.»

Mi konfesas: mi estis mirigita. Mi admiris la virton de l' virino kaj nun ekamis ŝin pli kiel edzo. Tamen neniam mi rigardis ŝian nudan korpon,

neniam ŝian karnon mi tuŝis, timante ke en paco mi perdos, kion en batalo mi savis. En tia geedzeco pasis pluraj tagoj. La geedziĝo faris miajn mastrojn pli agrablaj por ni. Estis neniu suspekto pri fuĝo; foje eĉ tutan monaton en la dezertaĵo kiel fidinda paŝtisto mi povis resti for.

Formikoj donas ekzemplon

7. Longe poste, dum sola mi sidis en la dezerto, nenion vidante krom ĉielo kaj tero, mi komencis mense ĉion pripensi, i. a. mi pensis pri miaj amikoj la monaĥoj kaj precipe pri la vizaĝo de mia patro, kiu edukis min, tenis min, perdis min. Dum tiel mi pensadis, mi ekvidas procesion da formikoj, kiuj umadis sur mallarĝa padeto. Ŝarĝojn mi vidis pli pezajn ol iliaj korpoj. Kelkaj per la pinĉilo portis semojn de herboj, aliaj forigis humon el fosaĵo, aŭ haltigis akvovojetojn per baraĵoj. Kelkaj, pensante pri la venonta vintro, por ke ilia stokejo ne ŝanĝiĝu en herbejon per la malsekigita humo, fortranĉis la pintojn de l' enportitaj semoj, kaj aliaj sub multnombra luktado elportis korpojn de mortintoj.

Kaj kio estas eĉ pli mirige en tia procesio: la elirantoj ne ĝenis la enirantojn; male, se iun ili vidis fali sub fasko aŭ ŝarĝo, subigante la ŝultrojn ili helpis. Kial detaligi pli? Belan vidaĵon prezentis al mi tiu tago. Tiel, memorante, ke Salomono resendas nin al la diligenteco de l' formikoj kaj instigas nian maldiligentecon per ties ekzemplo,¹ mi ekhontis pro mia sklaveco kaj eksopiris la ĉelojn de la monaĥoj. Mi deziris imiti la formikojn, kiuj laboras por la komuno kaj por kiuj, dum nenio estas ies propraĵo, ĉio apartenas al ĉiuj.

Fuĝo

8. Kiam mi revenis al la ĉambro, venis mia edzino. Mia rigardo montris mian animan triston. Ŝi demandis, kio estas. Mi rakontis la kialon, kaj

¹ Sen 6:6

instigis ŝin fuĝi; tion ŝi ne reĵetis. Mi petis ŝin silenti pri tio; tion ŝi promesis. Ni daŭre nur flustris inter ni, inter espero kaj timo.

En la grego mi havis do tre belajn grandajn bokojn; tiujn mi mortigis, faris trinkujojn el iliaj haŭtoj kaj preparis ilian viandon por survoje. Ĉe vesperiĝo kiam la mastroj pensis, ke ni retiriĝis por ripozo, komenciĝis nia vojaĝo, kun trinkujoj kaj parto de la viando.

Kiam la riveron ni atingis (estis ĉirkaŭ dek mejlojn diste) ni plenblovis la haŭtojn, ekkuŝis sur ili, kaj tiel ni konfidis nin al la akvo, malrapide piede pedalante, por laŭ la fluo kuntrenate longe for atingi iun lokon je la transa bordo, tiel ke la persekutantoj perdu niajn spurojn.

Sed intertempe la karno malsekiĝis kaj parte perdiĝis, kaj ni ne pli ol tri tagojn plu povis vivteni nin per ĝi. Ni trinkis ĝis satiĝo, prepare al estonta soifo. Tiam ni rapidis for, daŭre rerigardante – kaj nokte ni pli progresis ol dumtage: ĉu pro la embuskoj de vaste vagantaj Saracenoj ĉu pro la troa varmo de la suno. Mi kompatinda! Kvankam la menso komplete sekuras, tutkorpe tamen mi timtremas, dum tion ĉi mi raportas.

La mastro rekaptas la fuĝinton

9. Tri tagojn poste en krepuska distanco ni vidis, kiel du viroj sur kameloj plenrapide rajde alvenas. Antaŭsentante malbonon, mi pensis ke nia mastro planas nian morton, kaj la suno por ni ŝajne nigriĝis. Ni terure ektimis, kaj ĝuste kiam ni komprenis, ke niaj spuroj en la sablo jam malkaŝas nin, ni trafis dekstraflanke iun groton, kiu etendiĝis longe subteren. Ni do eniris la groton, timante pri venenaj bestoj (vipuroj, baziliskoj, skorpioj kaj similaj estaĵoj ja kutime kaŝiĝas en tia ombraĵo kontraŭ la brula sunvarmo). Sed tuj ĉe la eniro ni serĉis ŝirmon en iu kavaĵo maldekstre; ni apenaŭ kuraĝis paŝi plu, por ne, fuĝante la morton, trafi alian morton.

Ni pensis ĉe ni mem: Se la Sinjoro bonvolas helpi nin, ni saviĝis; se nin pekulojn li malŝatas, ni trovis nian tombon.

Kion vi pensas, ke ni sentis? Kiom da timo: antaŭ la groto tute apude staris nia mastro kaj kunsklavo, kaj per niaj spuroj ili jam trovis nian kaŝejon! Ho kiom pli aĉe estas atendi la morton ol efektive esti mortigita!

Mia lango ree balbutas kaj stumblas, kaj ŝajnas al mi ke ree la mastron mi aŭdas krei – apenaŭ mi kuraĝas fari sonon. La sklavon li sendas por fortiri nin el la groto. Mem li gardas la kamelojn, kaj kun elingita glavo li atendas nian alvenon. La servisto ĉirkaŭ tri aŭ kvar colojn progresis, kaj el nia kaŝejo ni vidis lian dorson, dum li ne vidis nin (ĉar tia estas la naturo de la okuloj, ke kiam post la suno oni eniras en mallumon, nenio estas videbla) – tiam sonis lia voĉo tra la groto: «Elvenu, vi krimuloj! Venu kaj mortu! Kial vi atendas, kiel tie vi kaŝiĝas? Venu! Vokas vin la mastro!»

Li ankoraŭ parolis, kaj jen! tra la obskuro ni vidis leoninon ataki la viron, mortigi lin kaj kuntreni lin sangokovritan pli internen. Bona Jesuo! Kiel granda estis nia teruro, kiel granda nia ĝojo!

Sen ke nia mastro tion sciis, ni vidis nian malamikon pere. Kiam tiu konstatis, ke la alia prenas la tempon, kaj ke duopo eble povas rezisti, senpacienca en sia kolero, kaj la glavon ankoraŭ enmane, li venis al la groto, ekkriis kvazaŭ frenezulo, kritikante la malrapidon de l' sklavo kaj jam estis kaptita de la sovaĝa besto antaŭ ol li atingis nian kaŝejon. Kiu estus supozinta, ke sovaĝa besto antaŭ niaj okuloj batalu por defendi nin?

Kiam estis forigita ĉi timo-kialo, restis ankoraŭ antaŭ niaj okuloj alia eble perejo – krom se eble leona furiozo estas malpli timinda ol homa kolero. Ni komplete timplenis, kaj apenaŭ kuraĝis moviĝi. Meze de tiel grandaj danĝeroj, sen ia ŝirmilo krom nia konscio pri ĉasteco, ni atendis kiel ĉio finiĝos. Frumatene la leonino, timante iun kaptilon kaj rimarkante, ke ŝi estas rimarkita, ekkaptis la ideton inter la dentoj kaj forportis ĝin, kaj

lasis al ni la kaŝejon. Ni ne tuj sentis nin sekuraj, sed longe atendis antaŭ ol eliri; ĉar plurfoje hezitante ĉu eliri, ni imagis al ni ke ni povos renkonti ŝin.

Liberigite el la danĝeroj li reiras al la monaĥoj

10. Fine defalis de ni tiu timo, kaj kiam do finiĝis tiu tago, je ekvespero ni iris eksteren. Ni trovis la kamelojn, kiujn pro ilia granda rapideco oni nomas dromedaroj¹: kviete ili maĉis kaj redigestadis sian nutraĵon.

Ni surseliĝis, kaj fortigite de nova nutraĵo ni dek tagojn vojaĝis tra la dezerto ĝis fine ni atingis la romian kampadejon. Oni portis nin al la tribunuso kaj ni ĉion raportis kio okazis. De tie ni pluvojaĝis al Sabiniano, kiu regis pri Mezopotamio, kie niajn kamelojn ni vendis.

Mia kara abato jam ripozis en la Sinjoro, kaj mi do iris al lia loko kaj dediĉis min al la monaĥa vivo; mian kompaninon mi konfidis al la virgulinoj, ĉar kvankam mi amis ŝin kiel fratino, sed mi ne donis min al ŝi kvazaŭ al fratino.

Malĥo kiel oldulo rakontis tion ĉi al mi dum mia junaĝo. Nun, maljuna, mi rakontas tion ĉi al vi. Al ĉastaj historion pri ĉasteco mi dismetas. Virgajn homojn mi admonas konservi la virgecon. Vi raportu al la posteularo, por ke ili sciu, ke meze de glavoj, meze de sovaĝaj bestoj kaj dezertaĵoj la ĉasto neniam povas esti konkerita, kaj ke la homo kiu dediĉas sin al Kristo ja povas morti, sed neniam esti venkita.

¹ La vorto dromedaro venas el greka verbo kun signifo kuri.